

LINGVA KRITIKO

STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Cefredaktoro; Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung; Robert Kreuz, LK.; Ing-ro R. Orengo, LK. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo

VOL. I * N-RO 15

MONATA ALDONO AL HEROLDO DE ESPERANTO

APRILO 1933

J. Penndorf: Pra-Esperanto.

Esperanto ne estas — kiel laŭ la antikva mitologio la diino Minerva tuj plenkreska kaj perfekta kaj belarmita saltis el la kapo de l' patro Zeŭso — momenta, genia ekpenso de sia aŭtoro, sed postulis longedaŭran, penigan paciencon. Cetere tiu iom-postioma maturiĝo interesas scienculojn eĉ pli multe ol la fina rezultato. Feliĉe, pri la deveno de Esperanto ni posedas detalan raporton de la majstro mem en treege leginda letero origine rusingva, adresita al N. Borovko, tradukita esperantlingven de V. Gernet, ofte represita, interalie en la „Originala verkaro de L. L. Zamenhof“, redaktita de D-ro Joh. Dietterle, paĝo 417 s.

Naskita en la ruspola urbo Bjelostoko, kies loĝantaro konsistas el kvar diversaj elementoj: rusoj, poloj, germanoj kaj hebreoj, kiuj ĉiuj parolas apartan lingvon kaj pro tio malamikite interrilatas, lia impresema naturo frutempe sentas la multepezan malfehicon de diverslingveco kaj konvinkigas, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiuj disigas la homan familion, kaj revas pri unu homa lingvo.

Kiel filo de lingvo-instruisto, Ludoviko jam en junaĝo ellernis krom la hejmaj (pola, rusa) lingvoj ankaŭ la germanan kaj francan, kiel gimnaziano la latinan kaj grekan; plue pri la hebrea li estis spenta. Dum kelka tempo forlogita de la form-kaj sonriĉaj klasikaj lingvoj, li intencis iam estonte entuziasmigi la homojn, por revivigi unu el tiuj ĉi lingvoj per komuna uzado¹. Sed baldaŭ li venis al la firma konvinko, ke nur unu nova, arta kaj neŭtrala lingvo estas konstituinda, kaj nun elpensadis artifikajn riĉegajn deklinaciojn kaj konjugaciojn. Sed ĉiam denove lin fortimigis la ŝajne senfina amaso da gramatikaj formoj kaj la dikaj vortaroj. Subite (en la kvina klaso de gimnazio) la treega simpleco de la angla gramatiko pligustigis lian opinion. Sub tia influo li eljetis la tutan balaston de senbezona formoj; do la gramatiko „degelis“ al plej malgranda regularo. En la sekvinta jaro li okaze turnis la atenton al du surskriboj „Svejcarskaja“ kaj „Konditorskaja“ kaj tiamaniere elkkonis la gravecon de la sufiksaj, kiuj „donas la eblon, el unu vorto fari aliajn vortojn, kiujn oni ne devas aparte ellernadi.“ Sekve — per derivaĵoj kaj kunmetaĵoj — la „teruraj grandegulaj vortaroj“ rapide malgrandiĝis. Nun li laboris racie kaj celkonscie kaj baldaŭ ekhavis skribitajn la tutan gramatikon kaj malgrandan vortaron.

Laŭ la principo de ekonomio komence li

¹ Same kiel en 1932 ree klopodas la nove fondita „societas Latina“!

elpensadis vortojn plejble mallongajn, t. e. kvazaŭ matematikan serion da facile elparoleblaj kumigoj de literoj (ekz. a, ab, ac, ad . . . , ba, ca, da . . . , e, eb, ec . . . , aba, aca, ktp.) kaj donis al ĉiu el ili la signifon de difinita vorto. Sed la provoj montris, ke tiaj elpensitaj vortoj² estas tre malfacile ellerneblaj kaj ankoraŭ pli malfacile memoreblaj. Sed baldaŭ li konvinkigis, ke la materialo por la vortaro devas esti romana-germana, ŝanĝita nur tiom, kiom ĝin postulas la reguleco kaj aliaj gravaj kondiĉoj de la lingvo. Fakte la nunaj lingvoj ja posedas grandegan provizon da jam pretaj vortoj internaciaj.

En la jaro 1878 la lingvo estis jam pli-malpli perfekta, kvankam inter la tiamaj „lingve universala“ kaj la nuna Esperanto estis ankoraŭ granda diferenco. La kvinan de decembro, kun kelkaj kolegoj, kiujn li estis gajninta por sia ideo, li festis la sanktigon de la nova lingvo. Sur la tablo, krom la gramatiko kaj vortaro, kuŝis kelkaj tradukoj. Dum tiu festo estis paroloj en la nova lingvo, kaj oni entuziasme kantis la himnon, kies komencaj vortoj estis jenaj:

I.

„Malamikete de las nacjes
Kadó, kladó, jam temp' está!
La tot' homoze in familje
Konunigare so debá.“

En la nuna Esperanto tio ĉi signifas:
„Malamikete de la nacioj falu, falu; jam tempo estas! La tuta homaro en familion unuigi (sin unuigi) devas.“

Tiu origina teksto — malgraŭ la malmultaj linioj — estas treege grava kaj altvalora por la historia evoluo de nia helplingvo. La senco ja estas tute klara.

En la titolo „lingve universala“ nin frapas unuavide la (germana—angla—pola) litero w anstataŭ la (latina—romana) v. La adjektivo jam estas karakterizita per la finaĵo a, sed la substantivo „lingve“ per e. Tion certigas el la teksto mem jenaj elkzemploj: malamikete, homoze, nacje, familje; plue sen speciala finaĵo (anstataŭigita per apostrofo laŭ la nuna regulo 16): temp' = tempo. Sed ankaŭ la adjektivo „tot“ (l. 3) perdis sian finaĵon; ni rajtas ĝin kompletigi al „tota“. Do rezultas la latina formo anstataŭ la franca „tuta“, adoptita en la defini-

² Restaĵoj de tiamaniere kreita lingvo enhavas la tielnomataj tabeloj vortoj de la nuna Esperanto; komparu § 30 de la Fundamenta Ekzercaro. Kvantam kontraŭbatalita de multaj, tamen ĉi tiu sistemo kiel tutaĵo estas admirinda specimeno de sagaca lerteco; sed la oftaj plendoj de komencantoj pravigas la supre cititan juĝon de l' majstro.

tiva Esperanto. Antaŭras la artikolo „la“. Same la genitivo estas esprimata per helpo de l' prepozicio „de“. Troviĝas (l. 1) „de las nacjes“ = de la nacioj. Do la litero s (same kiel en la lingvoj franca, angla k. a.) markas la pluralon, cetere ne nur de la substantivo, sed ankaŭ de la artikolo. La skribmaniero „nacje, familje“ celas plejble laŭ-naturan akcentadon. Oni memoru la vortojn³ de Zamenhof mem: „Kiam oni la unuan fojon aŭdas: familjo, internacia, oni sentas kvazaŭ vangofrapon; baldaŭ oni alkutimiĝas, nun oni sentus vangofrapon, aŭdante la malon.“ La ldistoj fakte preferas tiujn originajn formojn „nacje, familje“.

Sed tre strange aspektas la verbformoj: kladó, está (l. 2), debá (l. 4) pro la finvolkaĵoj akcentataj (laŭ la ritmo kaj speciala supersigno); -ó karakterizas la imperativon, -á la estantan tempon. La latinundenajn radikojn „kad-“ kaj „deb-“ anstataŭas en la nuna Esperanto la germana „fal-“ kaj la franca „dev-“. La infinitivo „konunigare“ tute similas al latina; oni disigu la vorton en ĝiajn elementojn: kon (= kun) + un (la numeralo sen la pronomo finaĵo -u de la nuna „unu“) + ig (sufikso multe uzata, ekz. lat. pur(ig)are, germ. rein-ig-en = E. pur-ig-i) + are (latina finaĵo, reviviginta en ldo). „So“ (l. 4) sendube estas la refleksiiva pronomo, do egalvaloras al la nuna „si“ aŭ pli vere „sin“ (sin unuigi!); ĉar tiutempe la akuzativa finaĵo ne jam ekzistas.

Krome troviĝas la prefikso mal- (laŭ la modelo de la franca „malheur“) en la vorto „malamikete“, same la sufikso -et (analoge al latinaj derivaj silaboj en „amicitia, pietas“); „homoze“ enhavas la sufikson -oz anstataŭ la nuna -ar (eble ĝi ankaŭ devenas el la latina lingvo; ekz. „aquosus“ t. e. „akvo-riĉa“ memoriĝas pri modernaj derivaĵoj „porroza, nervoza, ŝtonoza“).

Ci tiu analizo sufiĉu!

Finiĝis la unua periodo de la lingva kreado. Laŭŝajne⁴ la patro ĝis tiam ne malaprobis lian preferatan laboradon. Li intervenis nur, kiam la filo, absolvinte la gimnazian kurson, decidis ekstudi medicinon; pro la konsilo de kelkaj amikoj-kolegoj, kiuj lin kredigis, ke lia talenta filo sekve de tia cerbumado frenezigiĝos aŭ plej bone estiĝos revulo por la vivo ne taŭga. Do la patro postulis de la filo juran promeson, ke li — almenaŭ provizore — forlasos la aferon pri mondlingvo. Plena de doloro Ludoviko transdonis la kajarojn kun vortaro, gramatiko, versaĵoj kaj tradukoj, rezultato de multjara pripensado kaj serĉado. La patro per dikla ŝnuro ĉirkaŭligis la pakojn kaj fermis en ŝranko. (Daŭrigota.)

³ Mi citas laŭ artikolo de W. Lippmann en la libreto „La vendreda klubo“, redaktita de D-ro Dietterle (Leipzig, Hirt & Sohn, 1921) p. 51.

⁴ Edm. Privat, Vivo de Zamenhof (Leipzig, Hirt, 1923) p. 25.

JULIO BAGHY: DANĜERA VOJO.

III.

La evoluiga faktoro kaj gardanto de la lingva unueco estas la literaturo. La konscia, lingvorespektanta literaturisto utiligas la trafikajn vortformojn kaj vortformadon, esprimojn, paroliturnojn de la popola aŭ parolata lingvo por ne estiĝi ĝenan diferencon kaj por ne krei apartan idiomon.

Esperanto estas vivanta kulturlingvo, kvankam laŭ aĝo ĝi estas tro juna por havi tian riĉan literaturon, kian ĝi havas. Jen la ĉefa kaŭzo de tiuj ĝenaj diferencoj, kiuj jam ekzistas en la esprimoj, vortoj de la lingvoj literaturo kaj parolata. La uzantoj ne povas selvi la rapidaltkan evoluon de la literaturo kaj, ne vivante en nacia komuneco, ne konante aŭ diversmaniere motivante la sinsekvajn novaĵojn, ili senluziĝas aŭ ili mem senpripense enkondukas tiajn vortojn, kiujn ili pensas internacie kompreneblaj. Se oni pli atente ekzamenas tiajn vortojn, oni konstata, ke ili estas speciale daŭraj fremdaj vortoj aŭ en signifo absolute diferencas de la originala senco.

Relegante la malnovajn jarlekolektojn de „Lingvo Internacia“, „Universo“, „Revuo“ ktp., oni vole nevole admiras la lingvokreatan talenton de la ĉiamaj kulturantoj. Tiun periodon karakterizas la simpleco en la esprimoj, la plena eluzo de eblecoj sen rompo de la Fundamento. La plej vivantaj kaj originalaj estas eĉ hodiaŭ: arbaro, vagonaro, plenumi, nei, jesi, aldoni, eldoni, lernejo, etulo, junulino, junularo, eksigi, ekŝigi, aliĝi, bonvoli, kunmeti ktp. Ĉu estas pli taŭgaj aŭ pli vivaj: valdo, trajno, negi, suplementi, editi, skolo, kompili ktp.? Cetere tiuj ĉi vortoj estas ofte uzataj en neĝusta senco.

Preferata argumento de la amikoj de la novaj vortoj estas, ke D-ro Zamenhof mem uzis tiajn vortojn, kiujn la Akademio ankoraŭ ne oficialigis. Tiu ĉi argumentado ne estas akceptebla. Mi motivas: a) Zamenhof estis aŭtoro de la lingvo, b) eĉ aŭtoro estas homo, kiun povas erari aŭ ne antaŭvidi la sekvaĵojn de ĉiu sia paŝo, c) la aluditaj novaj vortoj troviĝas en la Biblio, traduko de la hebrea kaj kontrolita de speciala komisiono, korektanta la originalan tradukaĵon, d) li enkondukis tiujn vortojn en tempo, kiam la lingvo ankoraŭ bezonis aron da necesaj radikvortoj, en tempo, kiam la Plena Vortaro mem ne entenis milojn da neoficialaj vortoj kaj la danĝero ne estis facile konstatebla, nek antaŭvidebla. Ni ne entiru lian personon en la diskuton. Ni ne konas lian definitivan opinion pri la problemo, kvankam ekzistas unu manuskripto „Pri la novaj vortoj“ inter la postlasitaj skribaĵoj de la Majstro, sed ĝi havas la propraman skribitan malpermeson „Nepublikigota!“ Kial? Ĉu por ne vekti diskuton aŭ por duboj pri ĉi praveco post pripensado? Kiu scias? Egale! Ni ne entiru lian personon, ni respektu lian vorton sur la manuskripto, kaj ni ne sugestu per la enmikso de ĉi nomo, ke la kreinto iniciatis per sia agado — detruon de sia propra verko. Malgraŭ la rezigno pri la aŭtoraj rajtoj ĝi havis la moralan rajton konstrui plu.

Parolante pri la novaj vortoj mi uzos la Poezian Falkvortaron, kvazaŭ gvidilon en la haoso. Temas ĝenerale pri la novaj vortoj kaj ne speciale pri tiuj de la nomita vortaro.

Eĉ la 609 novaj vortoj senskrupule oni po-

vas akcepti apenaŭ 70—80 parte pro tio, ĉar ili estas ĝenerale uzataj, parte pro neceseco. (Ili estas falkaj vortoj, sed ne „poezifalkaj“.) Tamen kontraŭ unu bezonata vorto mi protestas: **poŭpo** = ŝimalantaŭo. Ĝia akcepto estus kontraŭ la Fundamento. La duonvokalo (simpla konsonanto laŭ mi) ŭ troviĝis ĝis nun kun vokaloj a kaj e. Kial do enkonduki ĝin kun aliaj vokaloj? La vorto ŝimalantaŭo estas peza, ne belsona kaj eĉ ne preciza. Oni proponu bonan, sed ne kontraŭfundamentan!

La tendenco forigi la vortojn, faritajn per la prefikso **mal-**, estas danĝera eksperimento kaj dubsukcesa novaĵo, ĉar oni ne povas malpermesi la aplikon de la sama prefikso ĉe tiuj vortoj kaj tiamaniere ni havos duoblaĵojn: **malfermi** = **uvri**, **aperfi**; **fermi** = **maluvri**, **malaperfi**. Kial la granda malsimpatio? Tiu ĉi prefikso havas la saman rolon en kelkaj naciaj lingvoj. Komparu: **itale male** = malbone, **malattia** = malsano, **malcontento** = malkontenta; **france maléchairé** = malklera, **malhonnête** = malhonesta.

La novaj vortoj kondamnas je morto ne sole la malajn vortojn. Ni trovas abunde vortojn, kiuj anstataŭas la uzon de sufiksoj. **aromato** = aromajo, **citato** = citaĵo, **molesti** = ĝenadi, **devori** = manĝegi, **sordida** = malpurega, **enorma** = grandega, **tepida** = varmeta, **pado** = vojeto, **damo** = sinjorino, **guno** = bovidino, **latrono** = ŝtelisto, **sikario** = murdisto, **kutelo** = tranĉilo, **taverno** = drinkejo, **baĉelero** = junulo, **povra** = kompatinda, **hasti** = urĝigi, **resurekti** = reviviĝi, **desaponti** = senluziĝi. Se tiu ĉi tendenco sukcesos venki, mia lingvo povas adiaŭi unu el siaj fundamentaj principoj, nome la **facileco**, kaj ĝi povos forĵeti sian vortifaran sistemon.

Parton de la novaj vortoj karakterizas, ke por la sama ideo servas pluraj radikoj. La nuancajn diferencojn ne ĉiam oni povas konstati, aŭ la nuancoj ne estas samsignifaj en la diversaj landoj. **Agaca** = **acerba**, **adversa** = **antagonisma**, **indigena** = **aŭfona**, **disipi** = **prodiĝi**, **vervo** = **elano**, **fanfaroni** = **gaskoni** (kelkloke tiu ĉi vorto signifas provoke heroadi, aŭ simple heroadi, sed ne perbuŝe), **gralo** = **hanapo**, **skizi** = **kroki** (kelkloke havas la signifon koncize verki), **meretrico** = **putino**, **baŭmi** = **pranci**, **klamo** = **rumoro**, **haĉi** = **stompi** (literature ne grava diferenco), **antro** = **grotto** = **kaverno**, **bestiala** = **brutala**, **poezio** = **poetiko**. Rimankinde, ke por la „koto de la antestoj“ ekzistas 4—5 vortoj sen klarigo pri la „nuancoj“.

La nova vortaro entenas kelkajn radikojn kun pluraj sencoj: **acerba**, **asidua**, **dista**, **fajna** (kun 4 signifoj), **genro**, **gvati**, **intermezo**, **keĵo**, **knaki**, **koheri**, **konvento**, **leĝera**, **magra**, **suspiro**, **niĉo**, **rara**, **sinistra**, **violenta**, **ambigua**. Kaj por la gloro de la logiko de la reformistoj mi mencias en tiu ĉi vortgrupo: **benigna** kaj **maligna**. Strange, kial ili uzas ĉi tie la prefikson **mal-**? Ĉu la radikoj estas ign-? Aŭ benign-? La klarigo de tiaj vortoj konfuza la lernanton. Por ekzemplo: **ambulatorio** = promenejo en teatro aŭ juĝejo; konsultejo por povaj malsanuloj. Nu, aŭdante pri ambulatorio mi tuj sentas la odoron de karbolo kaj neniam mi pensis pri teatro aŭ juĝejo. La klarige povas esti „dokta“ (klera), sed ĝi estas konfuza.

Mi deziras noti, ke la klarigoj de la novaj vortoj estas trispecaj: a) bonaj, b) intence malfacile kaj artifice faritaj por pruvi, ke la alprenado de la nova vorto estas necesa, c) malklaraj kaj pro tio miskompreneblaj.

a) **adolta** = maturaĝa, **dekado** = jardeko, **devori** = manĝegi, **fristiĉi** = frumangi, **pranzi** = manĝeti inter du normalaj manĝoj, **vikti** = manĝi en regula tempo, **vikto** = regule ricevita manĝo, **uvo** = vinbero.

b) **elano** = antaŭensvingiĝo (ĝenerale ĝi signifas figure vervon), **forci** = truddevigi (kial ne perforti aŭ simple devigi? ĉiu devigo estas ja altrudo), **folo** = iom freneza (kial ne frenezeta?), **frondo** = branĉo kun folioj (strange, branĉo ja ne estas bastono, vipo, vergo; ĝis nun por distingi oni diris senfolia branĉo), **gemuta** = estiganta agrablan senton de ĥejneco, senĝeneco, kamaradeco, **halukso** = pieda difkingro (ĥen! ni proksimiĝas al la tempo, kiam — laŭ mia serĉa aserto antaŭ jaroj — Esperanto havos apartan radikvorton por ĉiu piedo de la pulo; bedaŭrinde, ke ankoraŭ mankas la nova vorto por la mama difkingro por precize averti la infanon: „ne suĉu vian...!“), **konfeso** = religianeco (?), **kultivi** = kulturi proprasence (!?), **orgojlo** = malhumila fierego (ĉu ekzistas humila fierego?), **rigi** = provizi ŝipon per necesaj ŝnuroj, puloj kaj veloj (ĉu la radikoj ekipi ne sufiĉas?), **sapori** = impresi iamaniere la gustosenton (kial ne simple influi, impresi?).

c) **akvilono** = nordvento, **bizo** = malvarma norda vento, **ogro** = infanmanĝanta legendulo (ĉu tiuj tri vortoj estas propraj nomoj? pro la ĉiamaj majuskloj oni ne povas distingi inter la simplaj ideoj kaj verŝajnaj propraj nomoj), **dramaturgo** = dramverkisto (ne ĉie signifas la samon; ĉe teatroj troviĝas dramaturgoj — personoj kun tiu titolo — kiuj neniam verkis teatraĵon), **kiromancio** = mandiveno (mi klarigus: sortdiveno laŭ la mampolataj ĥinjoj), **marmito** = bolpoto, manĝilara kaldrono (?).

Malgraŭ tio, ke la kompilantoj zorge forigis la iom plilongajn malnovajn kunmetaĵojn, tamen aliflanke ili alprenis plilongajn aŭ pli malfacile prononceblajn vortojn. **Antropofago** = kanibalo, **baĉelero** = junulo, **cirkonspakta** = malriskema, **eskvizita** = bongusta, **galaksio** = lakta vojo, **laktvojo**, **integrala** = integra, **onomatopeo** = sonimita vortfaro, **sonimito**, **parcimona** = avara, **troŝparema**, **prestidigit** = lerte uzi fingrojn por ŝajmigi miraklon, **prominenta** = elstaranta (ĉu „prominenta roko“ estas bona esprimo?), **spektatoro** = spektanto (spektatoroj = publiko), **suplemento** = pliaĵo, **ekstraĵo**, **uzurpatoro** = uzurpanto.

Tute objekte dirante en la vortaro troviĝas radikoj, kiuj estas pli malpli diskuteble akceptindaj parte pro la ĝenerala uzado, parte pro neceseco, kaj fine, ĉar ili anstataŭas nekontentige fareblajn formojn per la vortkunmetoj aŭ per la afiksoj. Jen kelkaj el ili: **adoleska**, **altruismo**, **altruista**, **ambono**, **bagno**, **baŭmi**, **beata**, **bebo** (suĉinfano), **bestio**, **bizara**, **blazo**, **bobeli**, **bohema**, **ĉarumo**, **degni**, **deporti**, **disipi**, **dubo**, **eseo**, **eskapi**, **finto**, **flako**, **fraŭdi**, **gaki**, **gapi**, **giri**, **glugli**, **incend(i)**, **inundo**, **iriza**, **jodli**, **jubili**, **kampanjo**, **kiosko**, **klavikordo**, **koagli**, **kriĉi**, **kripo**, **kuloto**, **masakri**, **meki**, **mundi**, **niĉo**, **pimpa**, **remizo**, **retikulo**, **rezidi**, **rimorso** (konscienciproĉo), **sakri**, **sledo**, **stabila**,

spano, statisto, stumbli, sturmi, ŝminki, tom-
bolo, torpori.

*

La gramatiko estas la fundamento de ĉiu lingvo. Ĝi estas la maŝinaro, prilaboranta la krudan materialon de la vortoj, kiuj memstare ja ne multon signifas kaj kiuj ricevas vivon nur en la frazoj.

La netuŝebla lingva fundamento ebligis la evoluon, sed samtempe ĝi garantiis la stabilecon gramatikan. Se oni provos iamaniere alforĝi novan radeton al ĝi aŭ forpreni unu el la ekzistantaj, vanaj estas la miloj da vortoj, la maŝinaro ne funkcios plu kontentige. Ĝi bezonas la oleon de la absoluta respekto por resti senproĉa laborilo.

Mi rimarkis kelkajn deflamkiĝojn. Mi parolos pri la plej okulfrapaj. Tute mallonge.

1. La literŝparo ĉe la vorteto kaj- (k) estas kontraŭ la fonetiko. Al unu sono unu litero, al unu litero unu sono.

Se oni akceptos ĝin laŭleĝa, baldaŭ ĉiun oftan vorteton oni rajtos simile mallongigi. Ekz.: d = de, l = la, a = al, ĉ = ĉar, p = post, an = antaŭ, e = en ktp.

2. Jen strangaj formoj: aliu, alio, aliel, alies, aliam, aliom, alial; kelkiu, kelkio, kelkiel, kelkies, kelkiam, kelkion, kelkial.

Tiuj ĉi formoj povas esti naturaj en kelkaj naciaj lingvoj, sed ili estas iom danĝeraj en Esperanto. Unue pro la kontraŭlogika formado, ĉar ni formas la novajn vortojn per la radikoj kaj finaĵoj. Kio estas la radikoj en la vorto alia? Ĉu al'i' aŭ al'/? En la unua kazo ni devus formi la novajn vortojn jene: aliiu, aliiam, aliiies, aliiom. Nur por momento ni akceptu teorie, ke la korelativoj havas komunan radikon, la karakterizan literon l. Bone, sed en tiu ĉi kazo oni devus formi la vortojn jene: kelku, kelko, kelkam, kelkes, kelkom, kelkal, kelkel.

Cu la uzantoj de tiuj kontraŭleĝaj formoj ne rimarkas, ke ili kreis eĉ duabsencaĵon tie, kie ĝis nun ne povis ekzisti miskompreno? Jen: alie. Cu maniero aŭ loko? En la alia formado: kelke. Cu maniero aŭ loko?

Krom la supraj mallogikaj la tiaspaca formado entenas aliajn danĝerojn, ĉar tio faras la korelativajn finaĵojn gramatikaj finaĵoj. La deklinacio de la substantivo baldaŭ havus novajn kazojn, sed unu certe, nome la genitivon: patres, domes. Pro miskomprenoj, pro aliaj motivoj naskiĝus strangaj formoj: vesperam = vespere, kilogramom = kilogramon da . . . instruistej = instruiste, monal = pro mono aŭ: vesperiam, kilogramiom, instruistiel, monial. Oni povas aserti, ke tiuj formoj neniam aperus, sed pravi ĝin neniu povas. Postmilitaj formoj estas ankaŭ la aliu, kelkiu, alies, kelkies ktp., kaj neniu antaŭvidis ilin en 1914.

Fine ni devus kompreni, ke estas vortoj elastaj, kiujn oni ne miskomprenas en frazo, nek en konversaciaj unuvortaj respondoj. Ekz.: Mi aĉetis bombonon, vi aĉetis alian (alian ion kaj ne alian, nek aliaĵon; cetere tiu ĉi lasta estas sensenca vorto, ĉar ĝi ne signifas „alian aĵon“, same kiel ne signifas bela aĵo belaĵon). Cu vi atendas sinjoron Dont? Ne, alian (mi komprenas: alian sinjoron, alian iun). Mi petis de vi, li petis de alia. Tiu domo estas mia kaj tiu ĉi estas de alia . . . Similaj vortoj estas: kelka, multa.

Ni preferu la malnovajn formojn pro la unueco de la lingvo: alioke, kelkloke, multloke; alitempe, kelktempe; alikaŭze, multkaŭze ktp. aŭ sen vortkunmeto ni esprimu la deziratan sencan.

3. En poemoj ne unufoje mi trovis la kun-

tiritan formon de la kunmetita tempo estus . . . -inta. (Ekz.: forlasintus, batintus, eskapintus, amintus. La akcepto de tiu ĉi formo servus kiel kuragiĝo por uzi la formojn: forlasantas, batontas, eskapintas, amontos kaj ankaŭ en la pasiva formo: forlasitas, batotatas, eskapitos, amotis. Terura pezo por la menso kaj kompreno. La tendenco al konstanta mallongigo jam nun havas nedeziratajn fruktojn.

*

Por ilustri kaj samtempe doni impreson pri la hodiaŭa haoso mi verkis kelkajn versojn laŭ la Poezia Fakvortaro. Legu ilin kaj juĝu vi mem, ĉu la plendoj, seniluziigoj, protestoj de la malnovaj adeptoj ne havas konsiderindan bazon?

Ho, damoj ik senioroj, oldulo
hororas pro superbo de l' enorm',
lin desapontas prodigo de l' degno
ik kriĉas: „Resurekt' de l' IDO-form'!“

Response dupon serĉadas tardinto,
morose paŭtas kun senapreca gap',
ĉar dum lin premis al lito koŝmaro,
kredencis ni nektaron en hanap'.

Jes, ni ne negas, ni rigas veselon,
ostentos voston de nia PEGAZ'.
Post laniĉo, Junaj, al poŝpo koheru,
olduloj plonĝu k ek al Parnas'!

Ni ne gaskonas. La sun' de l' fortreso,
la „NETUŜEBLA LINGVA FUNDAMENT'“,
descendos balde ik estos kaputa
la rond' gemuta de l' notora gent'.

Futuron forcas ni. El la prizono
eskapis ni por pluki kun tenac';
la Poezia Fakvortaro servu
pri plena kripi kiel nur — prefac'.

Ni temerare agresas. Erudu!
Olduloj trاملu, kenaku pro rankor'
Konfrontas ni parcimanan paseon
k prosan nunon spite al rumor'.

Nin ne molestas ilia klamado;
softiĝos ĝi pro nia desapont'.
Kultivas lingvon ik hailas veselon
la novaj Leau, Couturat k Beaufront.

La prominentaj lucidaj ĝenioj
jam levas cenotafon por Vivant';
la kurtan moton ni konas de ĵaraj:
„Hej, vivu IDO! Bas, bas, ESPERANT'!“

Nun sekvos proza teksto, en kiu mi ilustros la plenan haoson, konsistantan el novaj vortoj kaj novaj formoj:

„L beletristes saŭdado forrestintus, s kelkiuj n insinuintus eventon, kiu cpresantas k vringantas alian amon a l lingvo kultivata. L literaturo serĉontas novalon p semi k ĝi

kultivatos d ingeniaj talentoj k l paseo, l lingves tradicioj, l febla k magra Esperanto sepultatos sen rimorso k sen — resurekto. Alies opinio povas diferencu d l mia, sed ĝi as mia animes sento. Vesperam l suno descendintos k regantos obskura tenebro. L primaveres revoj balde velkigitos.“

La supraj tekstoj kompreneble estas troigoj ikarikaturaj, sed mi devas rimarki, ke ĉiun vorton mi prenis el la menciita „fakvortaro“. La monstraj tekstoj versajne donis al vi impreson, kvazaŭ vi legus ian nekonsatan lingvon. Nu, tion mi ofte sentis dum la lastaj ĵaraj, kiam mi legis jen artikolojn, jen poemojn. Estas jam preskaŭ kutimo dum verkado aŭ tradukado de poemoj, ke oni senĝene kaj laŭbezone aliformas jam ekzistantajn aŭ uzatajn vortojn pro la rimo aŭ prenas taŭgan rimvorton el unu el la ekzistantaj lingvoj.

Jen ilustraj tekstoj:

Terure estas ja suferi,
malamon per la am' konkeri.
Terure estas ja sopiri,
malplenen per la rev' konkiri.

Se temas pri etosa pezo,
la rimo estas jen: aprezo;
se temas pri etosa speco,
la rimon ŝanĝu do: apreco.

Se dum la danc' ĉevalo ŝaŭmas,
ĝi certe en la rimo — baŭmas;
se la ĉeval' ŝaŭmanta dancas,
la rimo certe estas: prancas.

Esperanto estas la plej facila lingvo. Ĉu ne? Ĝia literaturo mirinde akcelas la unuecon.

Vole nevole naskiĝas la demandoj: ĉu la ĝeneco de poetoj konsistas en tio, ke ne trovante rimon en sia lingvo ili prenas el tiu lingvo, en kiu hazarde troviĝas taŭga vorto por rimo? (La plimulto de la novaj vortoj tiamaniere enŝoviĝas en la lingvon.) Cu tiuj teoriuloj ne rimarkas, ke per enkonduko de tiom da superfluaĵ vortoj ili mortigas vivantaj partojn, karakterizajn kvalitojn de sia lingvo?

Nenion valoras tia lingvokulturado, kiu malrespektas la lingvon mem kaj neniam tuŝos koron, neniam donos artan ĝuon tia poezio, kiu postulas ĉiunminute uzadon de vortaro. Al multaj ŝajnas, ke la teoriuloj treege malutilas per siaj komplikaj klarigoj, per siaj duabsencaĵ nuancigoj, kaj se ankoraŭ longe daŭros tiu ĉi senkonsidera polurado, fine oni povos ŝanĝi ankaŭ la nomon de nia lingvo: Desperanto. (Finota.)

Meguru Takahaŝi:

Pri la refleksiva pronomo.

Kun granda ĝojo kaj intereso mi tralegis la artikolojn de s-roj G. Avril, G. Schattat, E. Grosjean-Maupin kaj E. Malmkvist, kiuj kritikis mian malgrandan traktaton (L. Kr. n-ro 1). Post tralego mi rimarkis, ke ĉiuj inkluzive de mi, ne intencas nuligi la koncernan uzadon, kaj prenas kiel slosilon la saman ideon, nome, alkompreni la korelativan o al la adjektivo anticiopanta. Esp.: La sola (o), kion li povis fari, estis jebi sin en la akvon. La diferenco estas nur en tio, ke mi vidas la koncepton o subkasiata, prefere, enkonpigiinta en la adjektivon, dum la aliaj kritikantoj penas konkretigi la o iaforme antaŭ niaj okuloj. Pro tio fariĝis malsamaj la rezultatoj. Pliajn esplorojn mi evitu ĉi tie por ŝparo de spaco. Nun mi volas prezenti al vi novan problemon ne-

malgravan por via libera diskutado kaj kritikado.

*

La refleksiva pronomo estas unu el la plej komplikaj esprimoj en Esperanto, almenaŭ por la komencantoj-lernantoj. Sed estas granda felĉo, ke oni havas kiel referencon „La refleksiva pronomo en Esperanto“, la valoran venkon de D-ro W. Liippmann, bazitan sur la scienca esplorado pleje de Zamenhofaj ekzemploj. Tralernante ĝin, ĉar mi akiris de la aŭtoro la afablan permeson eldoni ĝian japanan tradukon, mi trovis du regulojn inter si kontraŭpuŝantajn.

Si meditas pri la vortoj de la patrino de ŝia lernantino (Marta 47/17).

Maltrankvila fariĝis la bela Sara pro

tiu spasmesprucanta gajeco de sia edzo (Rab. de Baharafi 13/14).

La supraj ekzemploj sub II B 5 b kavas komunan frazkonstruon kun tiuj sub II B 5 c:

Gustavo povis fari sian vojaĝon nur per la subteno de sia riĉa amiko. (La amiko estas la subjekto de la ago esprimita per „subteno“.)

Si vivis el la ŝteladoj de sia fianĉo.

La aŭtoro rekomendas uzi si kaj sia en la lastaj du ekzemploj, kaj tamen li pravigas la neuzadon de la refleksiva pronomo en la unuaj du, dirante:

„Vortoj“ esprimas la agon „paroli“.
Ĉi tiu „gajeco“ estas karakterizita per siaj atributoj kiel aktiva ĝojado, babildado, ridado ktp., do ankaŭ esprimas agon.

Cu al ni do estas permesata tia libereco efekti laŭ nia volo kiun ajn el la du formoj? Nea devus esti la respondo; se la verkinto volis jesi la demandon, li estus farinta ian rimarkon pri tio. Kiel klarigi tiun ĉi kontraŭpuŝon de l' reguloj?

*

Leipzig C 1, 26. 1. 1931.

Tre estimata sinjoro Takahaŝi!

Volonte mi respondas vian afablan leteron sen-datan, riceviton en decembro 1930a.

1. Vi multe ĝenas min, kiu estas okupata de mia (aŭ sia) laboro.

Laŭ l. de „La refleksiva pronomo en Esperanto“ (p. 5) la substantivaj vortoj „iu, tiu, ĉiu, kiu, neniu“ apartenas gramatike al la tria persono, ankaŭ kiam ili rilatas al la unua kaj dua. El tio rezultas, ke estas preferinde diri: Vi ĝenas min, kiu estas okupata de sia laboro. Sed se (laŭ nacilingvaj modeloj) oni ripetas la (substantivan) pronomon en la relativa propozicio, tiel ke la vorto „kiu“ akompanas ĝin kiel adjektivo, la supra regulo ne estas aplikibla, ĉar ĝi validas nur por substantivaj „iu, tiu, ĉiu, kiu, neniu“, kaj oni diru: Vi ĝenas min kiu mi estas okupata de mia laboro.

2. Cu „si“ kaj „sia“ povas signifi reciprokecon per si mem sen „reciproke“, unu la alian ktp.?

Ĉi tiun demandon respondas jese la jena frazo en „La refl. pron. en Esp.“ (p. 18 sub 5): La refleksiva pronomo estas ofte uzata en reciproka senco anstataŭ „unu la alian, unu al la alia“, jen kiam, jen sen aldono de la vorto „reciproke“. Generale estas rekomendinde, almeti la vorton „reciproke“, sed kiam la teksto sufiĉe montras la ĝustan sencan, tiu vorto estas superflua. Ekzemple: Patrino demandas patron, rigardantan tra la fenestro al la korto: „Kion faras la infanoj?“ kaj la patro respondas: „Mi batas sin.“ Tiookaze ne estas dubo pri la reciprokeco. Egale: „La taŝmentoj renkontis sin (= renkontiĝis)“, „La gefianĉoj arde amas sin“, „Ambaŭ duellantoj grave vundis sin“.

3. Ke tiu ricevu justan punon por lia krueleco! Cu ankaŭ „sia“?

Laŭ mia sento la vorto „puno“ esprimas la agon „puni“, kies logika subjekto estas la punanto. Ĉi tiu estas alia persono ol la krueleco, do „lia krueleco“. Ne senti en la vorto „puno“ la agon de punado kaj tial uzi „sia krueleco“, ŝajnas al mi io nenatura kaj tial malpreferinda.

4. Si meditas pri la vortoj de la patrino de ŝia lernantino. Maltrankvila fariĝis la bela Sara pro tiu spasmesprucanta gajeco

de ŝia edzo. Ĉu la uzado de „ŝia“ en ambaŭ frazoj estas eraro, ĉar, se oni komprenas en la vortoj „vortoj“ kaj „gajeco“ la agojn parolado, ĝojado, babildado, ridado ktp., la subjektoj de tiuj subkomprenataj agoj estas „lernantino de ŝi“ kaj „edzo de Sara“, kiuj sekvas post la subjektiva „de“?

Vi eraras. En la unua frazo la subjekto de la ago „paroli“ estas „la patrino“, ne „la lernantino“. La lernantino ne estas lernantino de la (parolanta) patrino („ŝia lernantino“), sed la lernantino de Maria (meditanta, sed ne vortojn parolanta), tial „ŝia lernantino“. Maria ne estas la logika subjekto de „vortoj“!

En la dua frazo la subjekto de la agoj „ĝoĝi, babili, ridi“ estas, kiel ankaŭ vi ĝuste diras, la „edzo“. Sed, ĉar ĉi tiu ne estas sia propra edzo, sed la edzo de Sara, kiu ne estas la logika subjekto de la „gajeco“, Zamenhof prave diris „ŝia edzo“ kaj ne „sia edzo“.

Ĝi vivas de la ŝtelado de sia (ne ŝia) edzo — alie ĉo la objektiva „de“: La dukino atendis la reporton de ŝia braceleto?

La frazo kun la „bela Sara“ troviĝas sub II B 5 b kaj la frazo kun „ŝtelanta edzo“ (tie „fianĉo“) sub II B 5 c de „La refleksiva pronomo en Esperanto“ (p. 14). El tio sekvas, ke la unua havas „ŝia“, la dua „sia“. (Laŭ la regulo en la dua alineo de II B 5 [p. 11]). Sed, ĉar principe ne estas diferenco inter ĉi tiuj frazoj, oni povus lokigi ĝin ambaŭ sub 5 b aŭ sub 5 c. Tion mi ne rimarkis dum la verkado de mia libreto. Nun ĉi tiu fakto iĝas min pripensi, ĉu oni ne povus tute elasi la specialan regulon rilatantan al 5 c kaj subigi ties ekzemplojn al 5 b, dirante: „Gustavo povis fari sian vojaĝon nur per la subteno de lia riĉa amiko“ kaj „Si vivas el la ŝteladoj de ŝia fianĉo“. Tio tre plisimpligus la aferon.

Vi atentigas al la subjektiva kaj la objektiva „de“. „De“ estas subjektiva, kiam la substantivo post „de“ estas la subjekto de la ago esprimita per la substantivo antaŭ „de“. El tio sekvas, ke pronomo sekvanta subjektivan „de“ apartenas al 5 c kaj devas esti laŭ ties regulo „si“ aŭ „sia“, kiam ĝi rilatas al la subjekto de la frazo. Sed se ni forigas 5 c kaj ties regulon, ni devas post ĉiu subjektiva „de“ uzi la nerefleksivan pronomon. Tion ŝajnas preferi ankaŭ Zamenhof, ĉar inter la ekzemploj sub 5 b ni trovas ankaŭ la frazon: „La ennovaĵoj estas farataj sub la persona respondeco de liaj aŭtoroj“, kiu enhavas subjektivan „de“.

Via atentigo antaŭvideble instigos min, en postaj eldonoj formuli la regulon en la dua alineo sub II B 5 nur: „Kiam la pronomo rilatas al la subjekto de ago esprimita per la substantivo, oni uzas „si“ kaj „sia“ kaj forigi tute la ekzemplojn sub 5 c, tiel ke „d) Apozicio“ iĝas „c) Apozicio“ (p. 14).

Post la objektiva „de“ oni devas uzi jen la refleksivan, jen la nerefleksivan pronomon, laŭ tio, ĉu la pronomo rilatas al la subjekto de la ago esprimita per la substantivo antaŭ „de“, ĉu ĝi rilatas al alia vorto, ekz. al la subjekto de la tuta frazo.

Do: La dukino atendis la reporton de ŝia braceleto. (Ilu alia reportos.) — La dukino prokrastis la legadon de sia libro. (Si mem legos.)

5. Ĉiu korniko serĉas similan al si kaj tio ĉiam estas korniko. Cu ne pli korekte: al ĝi?

Vi estas prava. Laŭ la regulo sub II B 3 de „La refl. pron. en Esp.“ oni uzas la refleksivan pronomon post adjektivoj nur, kiam la pronomo rilatas al la persono aŭ

aĵo, kiu mem havas la econ esprimitan per la adjektivo. Ankaŭ la serĉata korniko ne estas simila al si mem, sed al la alia korniko serĉanta, tiel simila al ĝi.

Dankante pro viaj afablaj bondeziroj mi salutas vin samideane kaj altestime
Dr. W. Lippmann (subskribo).
(Finota.)

LINGVA TRIBUNO

Preciza vorto por „eficienco“.
(Vidu L. Kr. n-ro 14.)

Ekzistas de multaj jaroj plene natura kaj taŭga esprimo por „Wirkungsgrad“, nome efikeco, pli detale koeficiento de efikeco. Ĝi enestas en la vortaroj de Wüster (Maŝinfalka Vortaro, Enciklopedia Vortaro) kaj Bennemann (Germana—Esperanta). La paralelaĵo efiko . . . efikeco estas tute analoga al la paralelaĵoj rezisto . . . rezisteco (en la mekaniko „Widerstand . . . Festigkeit“, en la elektrotekniko „Wirkwiderstand . . . Spezifischer Widerstand“), konduko . . . kondukeco („Leitwert . . . Leitfähigkeit“) kelkdeko da aliaj. Oni konsultu pli multe la ekzistantajn fakajn terminarojn!

Redakcio de Encikl. Vortaro Wüster.

„Stiefbruder“.

Por tiu ĉi germana vorto mi trovas en vortaroj nur la tradukon „duonfrato“. Ankaŭ Prof. D-ro Göhl uzas tiun tradukon (Ausführliche Sprachlehre paĝo 16). Duonfrato estas laŭvorte „Halbbruder“, kio estas io tute alia ol „Stiefbruder“. La diferenco estas klara: „Halbbruder“ signifas duonan sangparencecon (unu parto de la gepatroj estas komuna), „Stiefbruder“ nombras nur boparencecon (neniu parto de la gepatroj estas komuna, sed la infanoj estas kunkondukitaĵ per geedziĝo de gevidvoj). Sama diferenco ne estas ĉe la germanaj vortoj „Stiefvater, -mutter, -sohn, -tochter“. „Halbvater“ ni ne konas. Mi do kredas necese, ke Esperanto havu apartajn vortojn por la ideoj „Stiefbruder“ kaj „Halbbruder“.

G. H.

Cu „negocanta“ estraro?

Kun granda miro mi legis en la letero de GEA (Heroldo n-ro 716, pĝ. 1), ke tiu macia asocio havas „negocantan“ estraron. Por mia certigo mi konsultis diversajn vortarojn, sed trovis konstatita en ili mian supozon, nome: negoci = agi ktp. kun mona profito. Nu, mi pensas ke GEA ne celis esprimi ĉi tiun ideon, sed nur, ke ĝia estraro estas „afergvidanta“ aŭ „plenumanta“ instanco.

B. Knoll.

Bonvolu korekti!

En la artikolo de D-ro Porto Carreiro Neto (La formoj „ata“ kaj „ita“ en la Zamenhofa uzado) en „Lingva Kritiko“ n-ro 13 enŝoviĝis kelkaj pres- aŭ plum-eraroj. Sur paĝo 3, kol. 2, lin. 33, devas esti „diplomatiĝis“ (anst.: diplomatiĝis); sur sama paĝo, kol. 3, lin. 46, devas esti „esprimitaĵ“ (anst.: esprimataĵ); sur paĝo 4, kol. 1, lin. 33, devas esti „aktiva“ (anst.: pasiva).

Ĉiun redakcian materialon por Lingva Kritiko

sendu al s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo; sed la materialo por „Konsilanta Gramatiko“, redaktata de s-ro Jung, estas sendata al lia adreso en Köln.